

Pri la Verda Movado en Usono

De la 17a ĝis la 19a de aprilo okazos en la Universitato de Kalifornio en Los Angeleso kongreso kiu titoliĝas La Verdaj Movadoj kaj la sancoj por nova media/industria politiko en USA.

La kongreso havos tri ĉefajn celojn: detale ekzameni la historion kaj nunajn cirkonstancojn de la eŭropaj verdaj movadoj; esplori ties signifon por Usono, kaj aparte por Kalifornio; kaj provizi al la partoprenantoj bazon de daŭra informinterŝangado pri verda agado en la estonteco. Inter la partoprenantoj estos reprezentantoj de diversaj verdaj movadoj de Eŭropo kaj de civitanaj organizaĵoj de Kalifornio kaj aliaj partoj de Usono.

La sola oficiala lingvo de la kongreso estos la angla, sed se AVE-anoj povos ĉeesti, ili nepre skribu al: Prentiss Riddle, 1614 Postoffice St., No.1, Galveston, Texas 77550, Usono.

* * * * *

CELOJ DE AVE

Kunligado de Esperantistoj kiuj interesiĝas pri la Verda Movado. (t.e. la movado poliŭka kaj eksterpolitika kiu estas bazita sur ekologiaj principoj); uzado kaj plivastigado de Esperanto kiel komunikilo de la Verda Movado; peranta agado inter la Verda Movado kaj la Esperanto-Movado.

Membreco (malfermata al ĉiu kiu simpatias kun la celoj de la asocio): minimume 12 gld, pagebla per poŝtĝirkonto al "5479470 C.F.Krisperanto, Nederlando", kun indiko "por AVE"; aŭ oni sendu £3, \$5, 10DM, 30FF au 200BF rekte al la sekretario aŭ al la redaktoro.

* * * * *

Enhavo de Aveno 3

Nia jarkunveno dum la 70a U.K.	paĝo 2
Kiel la Verdaj Movadoj taksas Esperanton ? (1)	3
Kiuj estas membroj de A.V.E. ?	4
Pri la filozofio de Henriko George	5
Alvoko al ĉiu (eŭropa) AVE-ano	7
el Letero de la Eŭropaj Verduloj	8
Ĉu Esperanto en la Eŭropa Parlamento ?	10
Ĉu ekologiaj ideoj estas ĉiam senkompare ?	13
Por nova Esperanto-Oazo	14
Pri la Verda Movado en Usono	16



AVENO n° 3

espereble kvaronjara bulteno de la
ASOCIO de VERDULOJ ESPERANTISTAJ

Sekretario: Jean-Claude Thumerelle
Place de la Station 16, 7790 Warneton, Belgio

Redaktoro de "Aveno": Christopher Fettes
St Columba's College, Dublin 16, Irlando Resp.

Marto 1986

Karaj Legantoj,

Kiam mi proponis la starigon de AVE mi antaŭvidis ke ĝi bone funkcios pere de ne luksa sed almenaŭ konstanta bulteno. Tamen, kiel vi rimarkis, tia bulteno ne tiel aperis. Vi la legantoj estis tre paciencaj - ja, eble tro paciencaj: tre malmultaj riproĉadis min pro ties neapero; nu eble vi pensis, "Se mi ion dirus, mi mem ricevus la taskon redakti ĝin"; au eble vi estas el tiuj Esperantistoj kiuj jam havas tiom da laboro ke, kvankam vi bonvenigis la starigon de AVE, vi preskaŭ ne havis tempon remarki ke Aveno aperas neregule.

Nu mi kompreneble petas vian pardonon pri tiuj prokrastoj, kaj mi ne mencias la diversajn kialojn kiuj kaŭzis ilin, krom por diri ke nur mi kaj ~~mi kaj~~ miaj cirkonstancoj kulpas. Ĉu tio aspektas kiel kvazaŭ-invito al nova redaktoro? - Ho, jes! Kaj ne nur pro mia trookupado sed ankaŭ pro la fakto ke poŝtkostoj el mia lando, ĝis 1983 notinde malaltaj por presaĵoj, lastatempe triobligis.

Sed antaŭ ol impete proponi vin por tiu redakta tasko, demandu al vi ĉu vi povos ankaŭ presi (aŭ presigi) kaj dissendi la rezulton de via laboro? Kaj notu ankaŭ ke Aveno estas bulteno NE PRI EKOLOGIO, ĉar por tio vi povas legi Ekoperanto-n, sed PRI EKOLOGIA POLITIKO.

Do ekagu, ekskribu, kaj esperadu! C.F.



Nia Jarkunveno dum la 70a UK

Jen vere malfrua raporto! Tamen ion pri tiu okazaĵo ni devas menci. Ĝin ceestis tridek Esperantistoj, el ok landoj (D, I, IRL, N, NL, PL, SF); sed ni aldonu ke plejparte tiuj simpatiantoj ne estis membroj de AVE. Kiel fondinto de la asocio, mi povis informi ilin pri la origino, celoj kaj ĝisnuna agado, sed ili kompreneble ne povis fari decidojn pri la estonteco, aŭ akcepti la taskojn kiun mi esperis disdoni! Mi tamen ĉi-tie listigas tiujn farendajn taskojn, kun la espero ke iuj legontoj povos ion fari.

Do jen! Ni bezonas:

- a) varbfolio en Esperanto pri AVE
- b) nacilingvaj varbfoliojn pri Esperanto por Verduloj
- c) esperantistajn agantojn en ĉiuj verdaj partioj
- ĉ) pribultenan komisionon
- d) kasiston kaj/au financon komisionon
- e) komisionon pri enpartia agado
- f) reprezentantojn en ĉiuj landoj
- g) libretob kiu klarigas la esencon de verdaj ideoj .

Nu vi sendube povos aldoni viajn proprajn ideojn, sed unue vidu ĉu vi povus helpi pri tiuj ĵus menciitaj; tamen pripensu ke kvankam membreco de AVE eblas por ĉiuj kiuj simpatias kun ties celoj (vidu sur la lasta paĝo), estas pli bone, kiam temas pri AVE-reprezentanto, ke tiu persono estu membro de verda partio, au nemembro de iu ajn partio kiu tamen simpatias kun verdismo pli forte ol kun aliaj ismoj !

Pri nacilingvaj varbfolioj, la kompostitaj tekstoj jam ekzistas en angla kaj franca lingvoj, kaj provizoraj sed nekompostitaj en germana, itala kaj nederlanda. Tuj kiam ni havos reprezentantojn en la koncernaj landoj, kiuj aranĝos la presadon de la folioj, sufiĉa mono estos havebla por la unua eldono de 2000.

La bezono de kasisto estas sufiĉe urĝa. Avantaĝo estas ke dank' al malavara donaco ni havas ankoraŭ pozitivan saldon; kompetenta kasisto do havos la eblecon certigi ke ni neniam ion ŝuldos al iu ajn - kaj aparte ne al banko !

La foresto de AVE-anoj ĉe nia kunveno estas facile komprenebla. Universalaj Kongresoj estas laŭnecese multekostaj okazaĵoj, kaj do por Verduloj luksaĵo kiun ili povas ĝui nur malofte. Estus tamen agrable se ni povus ĉiam havi ian ajn renkontiĝon dum ĉiu UK. Mi do demandas, ĉu iu membro de AVE estos en Pekino, kaj se jes, ĉu li/ŝi (?zi) estus preta prezidi dum malgranda kunido tie? Se vi tuj informos min mi mendos ĉambron. C.F.

Estas sendube interese por la esperantistaj aktivuloj verdaj koni la oficialan vidpunkton de la diversaj naciaj movadoj ekologiaj, rilate la internacian lingvon.

Pro tio ni sendis al pluraj ekologiaj respondeculoj demandaron pri tiu punkto. En venontaj numeroj ni aperigos la respondon de Paul STAES (M.E.P. por Agalev) kaj aliaj; ĉi-tie ni prezentas tiun de François ROELANTS, deputito de la belga francparolanta movado, Ecolo, en la Parlamento de la Eŭropa Komunumo.

Sed unue, jen la kvin demandoj:

I. La programo eldonita de Ecolo antaŭ la lastaj europaj elektoj (la 17an de junio 1984) enhavas neniun proponon rilate la alportindajn solvojn al la fakte reala lingvoproblemo en la internaciaj rilatoj. Ĉu tiu problemo estas laŭ vi kaj laŭ via movado nur akcesora problemo ?

II. Konsiderinte la egan malŝparadon de tempo, de mono kaj de rimedoj kaŭzita de la senĉese pligrandiĝanta nombro de la laborlingvoj uzitaj en la Eŭropa Parlamento, ĉu vi intencas fari konkretajn proponojn ? Se jese, kiajn proponojn ?

III. Ekzistas meze de la Eŭropa Parlamento grupo de deputitoj kiuj agadas por ke Esperanto estiĝu laborlingvo. Kion vi opinias pri la agado de tiu grupo ? Ĉu vi havas rilatojn kun ĝiaj membroj ?

IV. En la okazo, se je la nomo de Ecolo vi intencus agadi favore al Esperanto meze de la Eŭropa Parlamento, ĉu poste via movado estus preta fari informkampajnon pri tiu ĉi problemo en Belgio ?

V. Ĉu en la venonteco vi intencas lerni kaj uzi Esperanton ?

Respondoj de François Roelants:

I. La programo de Ecolo por la eŭropaj elektoj, sendube tre densa, tamen ne enhavas apartajn proponojn rilate la uzon de la lingvoj en la internaciaj rilatoj. Tamen tiu forgeso estas korektita parte per letero sendita je la nomo de la Ecolo-kandidatoj al s-ro Marc Demonty de la Belga Esperanto-Federacio kaj kiu precizigas: "La Movado Ecolo pensas ke la uzo de Esperanto povas estiĝi adekvata maniero de renkonto inter diversaj kulturoj. Kompreneble la eŭropa grupo serioze pripensos sian aliĝon al la Eŭropa Parlamenta Esperanto-Grupo."

II-IV. Tuj ĉe la unua sesio de la Eŭropa Parlamento en Julio 84 mi decidis aliĝi al la Eŭropa Parlamenta Esperanto-Grupo por konkretigi la promeson faritan en junio 84 je la nomo de la movado Ecolo. Neniām mi estas kontaktita por nenia kunveno kaj neniū ano de tiu grupo prezentiĝis al mi de tiu momento. Mi bedaŭras tion kaj pensas alia parte ke izolita agado en unu lando de la Eŭropa Komunumo ne havas grandan intereson konsidere ke en tiu kazo temas pri internacia problemo. Tute sendube agado estas entreprenenda je la eŭropa nivelo kaj mi estas dispone por ĉia diskuto pri tiu temo.

V. Por bone plenumi mian parlamentan funkcion, mi devas esti efika; foroferante eble laŭ via vidpunkto pli malproksiman celon, mi komencis tiun ĉi jaron lerni la nederlandan lingvon, kiun mi ne povis akiri dum miaj studadoj faritaj en Francio kaj kies praktiko ŝajnas al mi esenca kiel belgo; dum la venonta jaro mi entreprenos la lernadon de la hispana, konsidere ke Hispanio eniros la Komunumon la 1an de januaro 1986. Mi konsolos min pri tio pensante ke la lernado de tiuj pliaj lingvoj estos taŭga por faciligi al mi la Esperanto-lernadon en la venonteco.

* * * * *

Kiuj estas membroj de AVE ?

Jen laŭlanda listo; iliaj kotizoj validos ĝis la apero de Aveno 4. Se mankas al vi ekzemplero de numeroj 1 au 2 (ambau 8-paĝaj) vi kompreneble rajtas peti ĝin/ilin.

AUS: K.Moxon, T.Steele; B: M.Delforge, M.Demonty, S.deWeerd, J.Foubert, M.Goedert, S.Moons, E.Spitaels, J-C.Thumerelle, G. van de Walle; CH: U.Haenni, G.Sporri-Gruber; D: K.Baldermann, O.Fischer, W.Günther, U.Haas, C.Noll, R.Paintner-Trumpp, H.+G. Ritthaler, A.Sanz, M.Schäffer, H.Schröder, E.Woite, M.Westermayer, W.Witte; F: R.Barreau, C.Baudé, P.Dubourg, G.Gabillon, J.Grégoire, D.Houguet, P.Touron; GB: C.Archer, H.Bell, D.Brooks, D.M. Davies, P.Foss, F.Howard, B.Leslie, E.Lewis, D.Lonsdale, E.McCanlis, P.Miles, W.Parrott, B.Phillips, S.Phillips, A.+M.Pitt, S.Shellard, W.Simcock, V.Yates; I: +A.Conti; IRL: T.Butterfield, C.Fettes, M.Mullarney; J: Oonisi S.; N: D.Draper, K.P.Hoff; NL: H.Bakker, K.deBoer, K.J.Klein; NZ: C.Adcock; S: E.Castell, H.Karlsson, B.Petersson, A-B.Sternfeldt; USA: P.Riddle.

*** Se via nomo erare ne aperas (au eĉ erare ja aperas!) en ĉi tiu listo, bonvolu informi la redaktoron.

Pri la Filozofio de Henriko George

Se oni priskribis Progreso kaj Mizero kiel libro kiu rekomendas imposton sur ter-valoroj, ĉi tiu estus simila al priskribanta Hamlet kiel fantom-historio.

Progreso kaj Mizero estas traktaĵo pri politika ekonomio kiu defias ortodoksajn ekonomikojn. Sed ankaŭ ĝi estas libro de filozofio kiu temas pri la naturo de Homaro, lia historio, liaj motivoj. Fakte ĝi estas pri etikoj, libereco kaj homaj justoj. Ĉi tie oni ne povas trakti pri la libro adekvate, kaj speciale tiuj partoj kiuj diskutas la leĝon de Homa Progreso kaj la Problemo de Individua Vivo.

George montris la distingon inter ter-posedaĵo kaj posedaĵo de objektoj faritaj de homo. La libro koncernas sin pri la persisto de mizero inter progresanta riĉeco.

Pri la dependaĵo de homoj je tero, George skribis: "... la produktojn de la maro oni ne povas preni, la lumon de la suno oni ne ĝuas, aŭ ian de la fortoj de naturo oni ne utiligas, sen la uzo de tero kaj ĝiaj produktoj. Sur la tero ni naskiĝas, per ĝi ni vivas, al ĝi ni denove reiros - infanoj de la grundo tiel vere kiel estas la herbo aŭ la floro de la kampo."

Estis Selwyn Lloyd, kiam Kanceliero de la Fisko en Britujo, kiu diras, "Ĉiaj impostoj estas malamindaj". Li volis diri, ke neniū ŝatas pagi impostojn. Efektive, la ĉefaj impostoj (sur enspezoj, sur riĉeco kaj sur elspezoj) estas penigaj, arbitraj kaj malutilaj.

Impostoj sur enspezoj tendencas senkuragi klopodadon - la laboristo estas punata se li plibonigas sian plenumadon. Impostoj sur riĉeco senkuragi ĉparadon. Impostoj sur elspezado faras varojn kaj servadojn pli multekostajn, kaj do ankaŭ senkuragigas produktadon.

La breĉo inter la riĉuloj kaj la malriĉuloj estas tre kurioza. Ni supozus, ke iuj viroj estus pli riĉaj ol aliaj. Ni ne atendus tre malgrandan riĉan klason kaj tre grandan malriĉan klason. Eĉ pli kurioza: kiel socioj progresas - kiel la laboristaro iĝas pli lerta kaj specialigita, kiel maŝinoj estas inventataj kaj teknologio evoluas, kiel la povo por krei riĉecon estas multobligata multatempe, porcio de la malriĉuloj estas apenaŭ plibonigata. Henriko George tiel perpleksiĝis per ĉi tiu paradokso, ke li aranĝis identigi la kaŭzojn por ĝi. Lia kuracilo estis forigi ĉiujn impostojn krom tiu sur la valoro de tero. Imposto sur ter-valoroj estas imposto surmetita sur la merkato-valoro de ĉia tero aparte de ĝia stato de evoluado.

George montris, ke imposto sur ter-valoroj estas la plej bona metodo de impostado, sed lia unuaranga celo estis transformi la socian sintenon rilate al tero. Tero estis nun trakita simile al varo. Sed ĝi estas absolute malsimila ol varo. Unue, tero estas en fiksita provizo. Due, tero ne estas produktata de homo. Tria, la Homaro ne povas vivi sen aliro al tero; tero estas necesega faktoro en ĉia produktado.

Kompreneble, tero inkluzivas la tutajn rimedojn de naturo: la supraĵon de la tero, la aeron super ĝi kaj la enhavojn de la grundo sub ĝi. Estas la posedeco de tero - la posedeco de la Naturo - kiu donas al kelkaj viroj la povon por kreski riĉaj. Kun ĉiu ekonomia antaŭen-iro, luprezo pligrandiĝas sed salajroj restas larĝe konstantoj. Tiuj kiuj posedas tero riĉiĝas sen peno.

Estas nenia rajto al tero. La pravigo por privata posedaĵo estas, ke riĉeco produktita apartenas al tiuj kiuj produktas ĝin. Sed kiu povas produkti eĉ iom da koto?

Kvadrata futo de tero en la centro de urbego eble ekvivalentas al akreo de malriĉa stepo. Kial? La altvaloro de tero en la centro de urbego okazas pro la ĉeestado kaj kreskado de la komunumo.

La solvo estas imposti la luprezon aŭ valoron de tero. Ĉi tiu ebligus privatan okupadon de tero daŭrigi, sed postulis, ke okupanto de ĉiu loko pagu al la komunumo por la privilegio de ĝia ekskluziva uzo. La sumo de la pago precize egalus la amplekson de la privilegio tiel mezurigita laŭ la merkato-valoru de la loko.

Nun ni povas kompreni kiel George rigardis tervalorojn tiel rimedo de socia justeco. La imposto je ter-valoroj establas egalajn rajtojn al la uzo de tero. La imposto sur tero devus fine anstataŭi ĉiujn nuntempajn maljustajn impostojn. Homoj ricevas la tutan produktadon de siaj laboroj, kaj mizero estus elradikigita.

W.H.Simcock (artikolo daŭrigota)

* * * * *

Jus aperis No.7 de Ekoperanto; 'Gazeto por Naturprotekto' ĝi subtitoliĝis. Dum Aveno estas por tiuj kiuj interesas pri 'eko-politiko', Ekoperanto servas ekologojn mem. (Oni kompreneble povas esti en ambau kategorioj.) Tiu lasta numero enhavas artikolojn pri Medio kaj Orienta Europo, Solidartago por Bhopal, Translima Aeropolucio, La Naturo kiel Apoteko, ĉtp. Ekzemplero estas havbla kontraŭ 2 irk-oj (ĉ. 2DM) de la redaktoro de Aveno.

Alvoko al ĉiu AVE-ano

La diversaj partioj verdaj de Eŭropo anoncis en siaj bultenoj la aperigon de la unua numero de novaĵletero nomita "La Letero de la Eŭropaj Verduloj".

Ĝis hodiaŭ tiu bulteno estas publikigita nur en du lingvoj, la franca kaj la angla; sed la eldonistoj sciigis sian intencon fari tradukon en aliaj lingvoj. En tiu konteksto, ŝajnas necese ke ĉiu verda esperantisto faru al la respondeculo de la bulteno proponojn por esperantlingva eldono.

Ni devas reagi multnombre por ke la redaktoro komprenu ke ekzistas eventualaj legantoj de la esperantlingva traduko. Kompreneble estus ankaŭ interese proponi helpon por la esperantigo de la tekstoj.

Jen la adreso de la redaktoro al kiu vi povas skribi: François Roelants du Vivier, Eŭropa Parlamento, 97-113 rue Belliard, B-1040 BRUSELO, Belgio.

Esperante ke multe AVE-anoj reagos tiun alvokon, mi petas bonvolu sciigi al mi kiajn respondojn vi ricevis al viaj proponoj. (Se eblas sendu fotokopion de la respondo.) Antaŭdankon.

Jean-Claude Thumerelle

Pluaj vortoj pri la sama temo

Sur la venontaj du paĝoj (8 k. 9) vi trovos tradukon de la unua paĝo de la supre menciita bulteno. Mi opinias ke nia plej granda espero pri aperigo de "oficiala" Esperantlingva versio realiĝos nur se sufiĉe de ni AVE-anoj proponos nin kiel tradukontoj de tiu "Letero"; kaj laŭ mi ni por tio bezonos helpon po unu tradukisto paĝe; tio signifas ke oni petos de ĉiu helponto la tradukon de nur kvar paĝoj en la jaro: kiu angla- au franc-lingva AVE-ano povas sin reteni de tiu tasko ?

Pri la leteroj al s-ro Roelants (petitaj ĉi-supre de J-C.T.) mi proponas ke vi skribu ne en Esperanto (kiun lingvon s-ro Roelants ankoraŭ ne legas) sed en franca au angla lingvo: ne gravas se per tiuj lingvoj vi malbone skribas; fakte tio eble helpus !

C.F.





LETERO DE LA EUROPAJ VERDULOJ

BULTENO de la EŬROPAJ VERDULOJ

Numero 1

Oktobro 1985

Redaktoro: ĉe François Roelants du Vivier
Eŭropa Parlamento, 97-113 rue Belliard, B-1040 Bruselo.

(Letero tradukita el la angla kaj francaj versioj far
A.V.E., Place de la Station 16, B-7790 Warneton.)

Redaktora enkonduko: LA LIGILO**

Ien ĝi, ne perfekta, ankoraŭ ne certa pri formo kaj enhavo, sed konscia pri ties estonta tasko: provizi rimedon pri komunikado inter Verduloj en diversaj regionoj de Eŭropo. La unua numero de tiu ĉi bulteno rezultis de la volo de la Eŭropaj Verduloj, kaj ties lanĉadon oni decidis je Sept.28/29 dum renkontiĝo en Bruselo.

Ni havas grandan ambicion pri "La Letero de la Europaj Verduloj," eĉ se tiu ĉi numero prezentas sin modeste kaj se la distribuado eblos nur pere de disdono kun la bultenoj de la membropartioj de la Eŭropaj Verduloj. Ni esperas evoluigi la rimedojn kiuj rezultigos novaĵleteron pli kompletan, pli allogan kaj pli sendependan pri disdono. Sed por fari tion ni bezonas vian helpon: ni bezonas viajn opiniojn, viajn kritikojn, kaj ĉiujn informojn viajn; tiam ni povos kune fari el tiu "Letero" veran ligilon inter tiuj sur nia kontinento kiuj elektis praktiki politikon ekologian.

Ni esperas plue ke tiu bulteno atingos ankaŭ niajn simpatiantojn kaj tiujn, proksimaj al ni, kiuj partoprenas kelkajn de niaj celoj.

Ni tamen jam konscias la bezonon plenumi atendon: estas do ĉi tiu atendo kiu naskis tiun leteron.

NACIA BALOTO EN BELGIO: Verduloj en la Parlamento kreskas de 9 al 14.

Estos 14 parlamentanoj verdaj en Belgio, kaj eble 15 se Agalev kaj Ecolo ricevos senatoron alelektotan. Jen la rezulto de la baloto kiu okazis la 13an de Octobro, kaj kiu aliflanke iom trompis la esperojn, ĉar la registaro kristandemokrata/liberala denove estros, kaj la grandaj politikaj familioj tradiciaj (Socialistoj, Soc.Kristanoj, Lib.Kristanoj) plifortiĝis. Tamen malgraŭ tiu tradicia, konservativa voĉdonado, Agalev kaj Ecolo sin kunprezentas kiel la kvara forto politika de la lando kaj kiel la sola vera opozicio. Konsiderante ke la Socialistoj, forĵetitaj nacinivele kiel la opozicio, tamen estiĝos registaro en Valonio, kaj ke la komunista partio ne plu ekzistas en la parlamenta kampo, oni komprenas ke, krom la Verduloj, ne ekzistas opozicio sur nivelo pli alta ol la regiona, kaj ke Agalev/Ecolo tial havas hodiaŭ apartan respondecon. La sukceso de la Verduloj estas aparte signifa en la plej "politika" asembleo de la plurĉambra sistemo belga, la Cambro de Representantoj, kie Agalev nun havas 4 anstataŭ 2 deputitojn, kaj Ecolo 5 anstataŭ 2.

Por eviti nekompletan bildon pri la rezultoj, necesas diri ke ili ne estis tiel elstare bonaj kiel okaze de la eŭropa baloto, aparte por Ecolo. Plejparte oni voĉdonis kontraŭ la dekstruloj au kontraŭ la maldekstruloj, kaj tio malbone influis la rezultojn por politika movado kiu proponas solvojn tre originalaj kompare kun skemoj tradiciaj. Kompreneble Ecolo kaj Agalev jam komencis ekzameni la kaŭzojn, same internaj kiel eksteraj, kiuj malpermesis pli grandan progreson. Ni tamen restas optimisma pri la estonteco.

** La versioj en angla kaj franca lingvoj uzas la vortojn "hyphen" kaj "trait d'union", kiuj senmetafore signifas "dividostreko".

Ĉu Esperanto en la Europa Parlamento?

Nia nelacigebla membro, Wolfgang Günther, kiu jam multe laboris por atentigi UEA pri la fakto ke "neŭtraleco" devas inkluzivi ekologian justecon, nun preparas rezolucion kiun, se eble, du verdaj MEP-oj prezentos al sia Parlamento dum 1986. Jen ĝi:

La Eŭropa Parlamento,
konsiderante,

ke la aliĝo de la Ŝtato Hispanio kaj de la Respubliko Portugalio altigas la nombron de la laborlingvoj de la Eŭropa Komunumo de 7 al 9;

2.

ke la aliĝo pliobligas la komunikadajn malfacilaĵojn ene de la Parlamento kaj ties suboficejoj;

3.

ke la antaŭvidebla estonta evoluiĝo ankoraŭ multobligos tiajn malfacilaĵojn, se ne eblas trovi solvon kontentiga por ĉiuj koncernatoj;

4.

ke la nuntempaj laborlingvoj ne reprezentas gravajn etnajn grupojn en apartaj membroj-ŝtatoj kaj estas rigardataj de ili kiel diskriminaciaj;

5.

ke akcepto de unu el la nuntempaj laborlingvoj kiel sola komuna laborlingvo ne aprobblas pro la al tio neeviteble ligata kultura diskriminacio en la ŝenco de identecperdo kaj pro aliaj praktikaj malavantaĝoj;

6.

ke ekde la estiĝo de la Eŭropa Komunumo unu el ĝiaj plej gravaj celoj estis kaj estas ĉiunivela paca komunikado inter la membroj-ŝtatoj;

7.

ke la nuntempa stato de la Eŭropa Komunumo sen "komuna dua lingvo por ĉiu"

7.1.

estas ligata por ĉiuj membroj kun altaj elspezoj koncerene la multekostajn lingvajn servojn,

7.2.

reprezentas temporaban investon,

7.3.

laŭre kreas necertecon rilate kompreneblon kaj erarojn,

7.4.

rilate de rekta interpretado neeviteble signifas certan perdon de ideoj,

7.5.

rilate de rekta interpretado malhelpas rektan konversacion;

8.

ke facila, de ĉiuj membroj de la Eŭropa Komunumo praktikata neetna lingvo kiel komuna dua lingvo signifas,

8.1.

ke egalrajteco estas akcelata pro tio, ke ĉiu membro komencas el egala situacio por akiri aldonan neŭtralan komunikilon,

8.2.

ke regiona identeco de la eŭropanoj (samkiel de aliaj) estas akcelata pro tio, ke ili ne plu estas subgataj al nenecesaj lingvaj devigoj,

8.3.

ke la superregiona identeco de la eŭropanoj (kaj de aliaj) estas akcelata pro tio, ke ĉiu eŭropano havas eblecon rekte interkomunikiĝi sendepende de ampleksaj aŭ internaciaj spertoj;

9.

ke rapida disvolviĝo de elektronika komunikado forte altigas la bezonon pri tia instrumento;

10.

ke la Internacia Lingvo Esperanto (ILO) estas la ununura vivanta kaj funkcia neŭtrala lingvo uzata en la pliparto de la mondo,

10.1.

kaj havas naciajn organizaĵojn en minimume 50 landoj,

10.2.

ĝi inkludas grandan nombron de profesiaj grupoj kiel kuracistoj, instruistoj, forstistoj, matematikistoj, agrikulturaj specialistoj, komputoraj sciencistoj, terminologiaj specialistoj kaj sciencan eldonejon,

10.3.

ke ĝi estas instruata en rapide kreskanta nombro de lernejoj kaj universitatoj, ekzemple en Clermont-Ferrand, Budapeŝto kaj minimume 40 universitatoj en Ĉinio;

11.

ke la akcepto de Esperanto laŭ konstato sub 10.3. kaj laŭ utiligo en multaj orienteŭropaj landoj, kie ĝi estas uzata ekzemple en komercaj rilatoj inter kooperativoj en Hungario, Pollando kaj Bulgario, signifas, ke ĝia apliko en okcidenta Eŭropo konsiderinde akcelas internacian interkompreniĝon;

12.

ke Esperanto aparte taŭgas por aplikado en Eŭropo, ĉar ĝi forte apogiĝas sur radikoj komunaj al eŭropaj lingvoj;

13.

ke la facileco lerni aliajn eŭropajn lingvojn grave plibonigas, se Esperanto estas unue lernita;

14. ke Esperanto plenumas je plej alta grado la kondiĉojn de internacia lingvo en tio, ke ĝi estas

14.1. ŝparema pro tio, ke ĝia limigita fundamenta regularo, ĝiaj regulaj verboj, ĝia sistemo de afiksoj, ĝia konformeco inter skribo kaj parolo kaj malesto de idiotismoj signifas, ke ĝi povas esti instruata kaj lernata je 25 % de la kostoj necesaj por simila instruiga nivelo de ĉiu alia eŭropa lingvo,

14.2. efika en tio, ke pro ĝia koncizeco kaj unusignifeco (klare elmontrita per la esploroj pri distribuita lingva tradukado, DLT) ĝi estas eksterordinare taŭga por rapida kaj fidinda komunikado,

14.3. neŭtrala kaj nediskriminacia per tio, ke ĝi ne atingas ŝparemon kaj efikecon je la kostoj de la ceteraj lingvoj, sed ahvas kiel memstara lingvo sendependan propran identecon;

15. ke la Internacia Lingvo Esperanto havas je sia dispono la Universalan Esperanto-Asociacion (UEA), kiu havas sian centran oficejon en Roterdamo, kune kun 2 oficejoj en Parizo kaj Nov-Jorko, en rilatoj kun la Unuiĝinta Naciaro, kaj estis rekonata ekde 1954 de UNESCO kiel organizaĵo de kategorio B pro la rezultoj, kiuj estis atingitaj per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la reciproka kompreniĝo de la popoloj de la mondo

1. decidis, ke kursoj de la Internacia Lingvo Esperanto estu ofertataj en/far de la Komunumaj Institucioj egalrajte kaj oficiale egalagnoskate apud tiuj de la oficialaj komunumaj lingvoj;

2. petas la ŝtatajn membrojn de la Eŭropa Komunumo oferti en siaj universitatoj studprogramojn, kiuj inkludas Esperanton kaj akceli la enkondukon de Esperanto en ĉiuj edukaj institucioj, en kiuj fremdaj lingvoj estas instruataj;

3. proponas, ke la Eŭropa Komisiono enketu pri tiaj aspektoj de la Internacia Lingvo Esperanto, kiuj rilatas al la eblecoj de tiu lingvo kontribui al solvo de la lingvoproblemo en la Eŭropa Komunumo;

4. instrukas la Prezidanton de la Parlamento transsendi tiun ĉi rezolucion al la Komisiono kaj al la ŝtatoj-membroj.

ĈU EKOLOGIAJ IDEOJ ESTAS ĈIAM SENKOMPARE?

Mi multe pardonpetas se mi ofte ŝajnas malkredulo en Verdula medio. Miaopine Verduloj ne povas krei politikan partion. Male ni devus resti Movon. Ni devus agi tra aliaj partioj por disvastigi niajn ideojn. Se ne, ni ĉiam estos tro malmultnombraj. Eĉ se ni parte gajnus povon, niaj reprezentantoj rapide iĝus profitemuloj de tiu povo kaj ne pli laŭiĝus niajn ideojn.

Por tiuj kialoj, miaj ideoj se ne tre ortodoksaj, estas diskutindaj kaj ne devas esti antaŭpripense konsiderotaj kiel reakciulaĵoj.

1- Ekzemple, mi estas Maltus-anulo, ĉar la homoj tro multnombraj forkonsumas medion kontraŭ vegetaĵoj kaj aliaj animaloj por anstataŭi ilin tra la Mondo.

2- Mi ne estas favora je alvoko de nia amiko, mi eĉ povas diri samideano, J-C. Thumerelle: li deziras kontraŭigi baraĵkonstruadon en sia lando. Tiu ŝajnas vera verdula ideo ĉar baraĵo detruus larĝan parton de naturo en tiu valo. Sed se ne estas preparita elektro per tia baraĵo, ĉu ne estos anstataŭita per nuklea fabriko?

3- En Francio naturasocio luktas kontraŭ starigo de skulptaĵo en parko de iu fondaĵo. Tiu skulptaĵo 15 m.-alta kaj 2000 t.-peza estas konstruita en paralelepipedo betona kun kvindeko de aŭtaĉoj en ĝi. Laŭ mi tiu estas artista verko. Kion estus dirintaj tiuj cenzuruloj, lastjarcente se oni proponus ilin konstruon de Efel-Turo meze de Parizo?

Paŭlo.

Por Nova Esperanto-Oazo

Mi ne volas florojn sur mia tombo
aŭ en iu ajn imaga paradizo,
sed dum mia vivo
kaj sur nia planedo.

Justo

Sub la nomo "Esperanto-Oazo" mi konstruis kaj administris en hispana kamparo domon kaj kampadejon por Esperantistaj gastoj. Tiu nomo estis dusence elektita, lingve kaj naturamike, ĉar mi intencis krei ne nur lingvan sed ankaŭ belan naturan hejmon.

Unue mi pensis starigi dometon kvazaŭ malgrandan kernon de estonta Esperantio: dekon da bangaloj por luigi; ĉefan domon kun biblioteko, lernoĉambro, dormoĉambroj, manĝejo, trinkejo; naĝejon kun sunvarmigita akvo kaj parcelojn por kampadi. Pro manko de financa kaj alispeca kunlaboro, mi estis devigata malgrandigi la projekton - ĝis nura kampadejo kun domo - kaj realigi ĝin tute sola. Ĉiujare mi havis la esperon krei grupeton da diversnaciaj gesamideanoj, kiuj pli malpli konstante restus ĉe mi kaj kunlaborus por la bona evoluo, pligrandigo kaj plibonigo de la entrepreno. Bedaŭrinde mi ne sukcesis atingi tiun celon, kaj post 4 jaroj mi devis forlasi la aferon. Preskaŭ ĉiuj gastoj riproĉis al mi, ke mi ne sufiĉe propagandis ĝin.

Ekde 1 jaro mi vivas nun denove en granda urbo, en la tiel nomata civilizo, enspiras la aŭtogasojn, suferas pro la bruigo de la aŭtomotoroj, loĝas en malgranda ĉelo de granda konstruaĵo kvazaŭ abelo en abelujo kaj kontribuas per grandparte stultiga laboro al la riĉiĝo de iu komerca entrepreno.

Same kiel mia amiko Justo, mi ne volas atendi ĝis mia morto por havi florojn, nek deziras vivi ĉiam en nehumana kondiĉoj. Tial mi serĉas gesamideanojn, kiuj kune kun mi volas konstrui novan daŭreman Esperanto-Oazon (E-O).

Jen la principaj bazoj de mia projekto:

- Ekologio staras antaŭ ekonomio.
- Esperanto estas nia oficiala lingvo, sed ni akceptas ĉiujn geverdulojn kiuj volas lerni ĝin.
- En la Esperanto-Oazo regas amo kaj racio, kaj ne havas spacon la krueleco, kiu jam speguliĝas en la stulta germana proverbo "ĝoji pro alies malfeliĉo estas la plej granda ĝojo". Ni ne volas nome esti ŝajne feliĉaj je la kosto de aliaj, sed vere feliĉaj kune kun niaj gesamideanoj.
- Ni penas eviti la maljustojn kiujn suferas kutime la virinoj, kaj ni aspiras disdoni la taskojn kaj decidrajtojn ĉiam duone inter virinoj kaj viroj.
- Sur la tereno de la E-O rajtos veturi nur senbruaĵaj veturiloj, kiel ekzemple bicikloj kaj elektraj aŭtomobiloj. Eksceptoj, nurkiam ili ne estas eviteblaj.
- Fumi en la E-O estas konsiderata kiel agresa ago kontraŭ la kunloĝantoj kaj la naturo.
- Generale, neniu ĉe ni kulpas pri via malfeliĉo; la responsuloj regas ekstere. Lasu do vian agresemon antaŭ nia pordo kaj estu en nia hejmo pacema, amema kaj aminda.

Ekonomie povas ekzisti du enspezofontoj en la E-O: unuflanke el la luigado de ĉambroj kaj parceloj; aliflanke el la kontribuo de mecenatoj, finance fortaj geverduloj kaj gepensuloj kiuj volas loĝi ĉe ni por longa tempo aŭ por ĉiam.

Konvena lando por starigi la E-On povas esti Francio. La loko estu neindustria kaj nature bela. Granda bieno kun renovigendaj konstruaĵoj en akvo- kaj laŭeble sunoriĉa regiono estus taŭga.

Se ni ne trovas pli simplan solvon por aĉeti la terenon, ni povus apliki la modelon kiu estas uzata nuntempe en FRG por fondi la ekologian "Ekobanko"-n:

La E-O estos kooperativo. Ĝia kapitalo konsistas el la partoj, kiujn ĝiaj membroj akiris. Por aniĝi oni devas aĉeti minimume 1 parton (ĉe Ekobanko tio estas 100 CM). Ĉiu membro havas 1 voĉon, sendepende de sia kapitalparto.

Dum la unua fazo, ĝis la starigo de la E-O, ni fondos E-O-amikaron, kies tasko estos informi pri kaj propagandi la projekton. Baza kondiĉo estas atingi sufiĉan kapitalon por aĉeti taŭgan bienon.

Por ne fari tro longa tiu ĉi unuan informon, mi donos pli da detaloj en venontaj artikoloj.

Diference de la Ekobanko, la Esperanto-Oazo estos nur je la dispono de siaj membroj kaj ties amikoj, pri kiuj responsas la invitinta membro. Tio signifas, ke ĝi ne estos hotelo aŭ publika kampadejo, ĉar ni en tia kazo ne povus determini la aspiritajn vivkondiĉojn sur nia propra tereno.

Tio ĉi estas la unua paŝo por starigi verdulan hejmon. Viajn ideojn, sugestojn kaj proponojn bonvolu sendi al la suba adreso.

Akiles Sanz, Hafenplatz 6, Ap.206, 1000 Berlin 61.

* * * * *

Pri Komunumo

La ĉi-supraj ideoj de nia amiko Akiles estas tre laŭdindaj, kaj ili memorigas min pri la plej lasta libro de Rudolf Bahro, Konstruante la Verdajn Movadon, en kiu la aŭtoro multe kaj saĝe skribas pri la bezono de mondo kie la komunumo kaj ne la urbo devos esti la baza unuo de homa grupiĝo.

Mi esperas ke niaj germanaj legantoj skribos al ni pri la pensoj kaj agado de Bahro, kiu antaŭ duonjaro forlasis Die Grünen ĉar li ne plu fidis pri politiko partia. Mi mem ankoraŭ opinias ke oni povas ion pozitivan fari per tia politiko; mi tamen trovas la ideojn de Bahro la plej simpatiaj el tiuj kiuj atingis miajn orelojn el F.R.Germanujo. Komentojn, mi petas!

C.F.

* * * * *

MI ESPERAS ke la venonta numero de Aveno aperos dum Junio; bonvolu do sendi materialon antaŭ la mezo de Majo. C.F.